

esperanto aktuala

Revuo de la Esperantista Brusela Grupo

Numero 4 / 2013



Fanrevua Festivalo en
Bruselo
UDODUF prezentis interesajn
Esperantaĵojn



69eme BIENNALE NATURISTE DU FANZINE

21-22-23 JUIN 2013

VENDREDI
Vernissage: Camille Déjoué
Wapp be Do Wapp Wappetona
Ouisiti Glace
Concert: Missiles Of October

MARDI & DIMANCHE
Stands fanzines Dedicaces
Exposition

BUNKER CINÉ-THÉÂTRE & La T.A.G
66A rue des Plantes - 1210 Bruxelles

Avec le soutien de la Commission Communautaire Française de la Région de Bruxelles-Capitale

la découverte du dessin spontané
ANDE DESSINÉE Quatrième festival de fanzines à Bruxelles ce week-end

C'est la quatrième édition mais chaque année, nous changeons de nom. Cette fois, nous sommes donc la 69^{ème} biennale naturaliste du fanzine. Le ton est directement donné par le directeur du festival, Patrice Bauduinet. Ce passionné de BD, amoureux du Do It Yourself, a ainsi doté la capitale de l'Europe d'un festival éphémère, entièrement gratuit et sans prise de tête.

Le fanzine est en fait la contraction de fanatisme et de magazine. Il s'agit d'une publication imprimée, périodique ou non, indépendante, créée et éditée par des passionnés, des dessinateurs et des auteurs amateurs la plupart du temps.

Popularisé par le mouvement punk à la fin des années 70, le fanzine a connu un regain d'intérêt ces dernières années avec comme message d'arrière plan de critiquer les médias pour devenir soit même un média.

Évidemment avec internet, les réseaux sociaux et d'autres événements de sociétés comme ceux des Indigènes, le genre a trouvé une seconde jeunesse. La preuve également avec ce festival bruxellois qui chaque année augmente sa popularité.

« La première année, nous avons reçu la salle du Bunker et nous sommes allés derrière la gare du Nord, à Saint-Josse, précise Patrice Bauduinet. Nous avons attiré 80 personnes pendant les trois jours de festival. L'année dernière, ce sont 800 curieux qui se sont pressés à notre festival de fanzines. Cela montre que le genre devient de plus en plus populaire. »






«**La Semo**» (jes ja , en Esperanto) estas festivalo konata por sia muzikprogramo miksitaj kun stratartaĵoj : ĵonglado, akrobatado, teatro, ... Ankaŭ, la aparteco de tiu festivalo estas la konsciigo pri daŭrigebla disvolvo, solidareco, naturprotektado, diverseco...

Tiu 6a eldono okazos en tutnova (magia) loko : la parko de la urbo «Enghien-Edingen» ne tro for de Bruselo, ekde vendredo la 12a ĝis dimanĉo la 14a de Julio.

Dank' al mirindaj famaj muzik-artistoj invititaj, La Semo esperas bonvenigi pli ol 20.000 partoprenantojn. Muzik-scenejo flosos surlage, asocioj proponos agadojn, ktp ...

Ĉi-foje, deko da motivitaj Esperantistoj prezentos nian belegan lingvon, donos iniciadajn kursojn, ... en budo ĉe la «village associatif» de la festivalo ...

Bonvenon al vi ! www.lasemo.be



Voĉoj de la Tempo » de Eduardo GALEANO La modela bankisto

John Pierpont Morgan estis proprietulo de la plej potenca banko de la mondo kaj de okdek ok kromaj entreprenoj.

Ĉar li estis homo tre okupata, li forgesis pagi siajn impostojn.

Li estis nenion deklarinta de tri jaroj, ekde la krizo de 1929. Tiu novaĵo vekis la koleron de la amasojn ruinigitaj de la bankroto de *Wall Street* kaj kaŭzis nacinivelan skandalon.

Por senigi sin de sia fifamo kiel rabema bankisto, la aferisto mendis la servon de la respondeculo pri publikaj rilatoj de la cirko *Ringling Brothers*. Tiu fakulo konsilis al li angaĝi naturan fenomenon, Lya Graf, 30-jarulinon kiu mezuris sesdek ok centimetrojn, sed kies vizaĝo kaj korpo havis neniom de nano.

Do, oni lanĉis grandan reklam-kampanjon, kies pinta aranĝo estis foto kiu montris la bankiston sidanta sur trono kun vizaĝo de bona familia patro, tenante la miniaturan virinon sur siaj genuoj. La ideo estis, ke li reprezentu la financan povon kiu protektas la popolon mizerigitan de la krizo. Tio estis fiasko.



K O L O F O N O

38a ELDONJARO. **Redaktoroj** : Laurent kaj Samy Loisse : aktuala@esperantobruselo.org ;
 Fondita en 1976, de Léo De Bruyne, informilo kaj oficiala organo de Esperantista Brusela Grupo, societo centjara neprofitcela fondita je la
 10a de Februaro 1907, registrita en la belga ŝtata oficiala ĵurnalo «Belgisch Staatsblad, Moniteur Belge» kun la n° 0419498274, honorigita
 kiel reĝa societo ek de la 29a de Majo 1957. **Aktuala estas libere elŝutebla tie** : <https://sites.google.com/site/ebgaktuala/>
Prezidanto : Angelos Tsirimokos prezidanto@esperantobruselo.org ; **Kasisto** : Jan Amadori jan.amadori@gmail.com
Sekretario : Laurent Loisse sekretario@esperantobruselo.org , **Informoj / kursoj** : Françoise Pellegrin fransuaz@esperantobruselo.org
Eventoj : JM Nicolas de Buyl nikolao@esperantobruselo.org **Retejo de EBG** : www.esperantobruselo.org
Abona membriĝo : 10 aŭ 13 eŭroj jare, konto : **IBAN** : BE87 5230 8055 0794, **BIC** : TRIOBEBB de la Esperantista Brusela Grupo
Kunvenejo : rue Van Maerlant 2, 1000 Bruselo Metroo Maelbeek ĉiumerkrede 18h30-20h00 - Tie nek poŝtkesto, nek telefono .
 Vidpunktoj de artikoloj en Aktuala ne nepre spegulas opiniojn de la ĉefa redaktoro aŭ de EBG - Esperantista Brusela Grupo

A G E N D O



Bonvolu kontroli la ĝisdatigojn sur nia nova retejo : www.esperantobruselo.org

Ĉi-jaron la kunvenoj daŭrigos ĝis la fino de Julio.

Ĉiu persono menciita sur la listo por eniri la konstruaĵon estas bonvena.
 Plej verŝajne, okazos dum la somero unu aŭ du **Esperanto-Kafejo en Bruselo**.
 Invito estos sendita kiel kutime. Por la personoj kiuj ne havas retpoŝtadreson
 kaj kiuj volas ekscii pri tiaj agadoj, bonvolu kontakti Nikolao
nikolao@esperantobruselo.org aŭ per telefono, vespere : 0478 382 981



EBG faras alvokon al prelegontoj por plenigi sian kalendaron,
 bonvolu kontakti nikolao@esperantobruselo.org aŭ vespere 0478 382 981

JULIO

**Vendredo la 12a ĝis
 Dimanĉo la 14a**

LA SEMO en Enghien-Edingen (BE)

Festivalo pri muziko k stratartaĵoj. i www.lasemo.be

**Sabato la 20a ĝis
 Sabato la 27a**

UK en Rejkjaviko

AŬGUSTO

**Sabato la 10a ĝis
 Dimanĉo la 18a**

FESTO - Reveno al AMIKEJO

Muzikfestivalo organizita de JEFO en Kelmiso (BE)
festo.jefo.fr

SEPTEMBRO

**La 4a, 5a, 6a, 7a, 8a,
 14a, 15a, 21a, 22a,
 28a & 29a** **11:00-18:00**

Domo de la Eŭropa Historio en Ekzilo (KVS)

Ne forgesu rezervi : 02 210 11 12 www.kvs.be

Merkredo la 11a **18:30-20:00** **Unuaj postsomeraj kunveno kaj kursoj**

Domo de la Eŭropa Historio en Ekzilo

La ekspozicio remalfermos siajn
 pordojn ĉe muzeo KVS ekde la
 4a de Septembro, esperante ke
 oni korektos la Esperanto-
 skribaĵojn (vidu apude) !

Ne forgesu rezervi :

02 210 11 12

www.kvs.be

DOMO DE EŬROPA HISTORIO EN EKZILO

BONVENON AL LA DOMO DE EŬROPA
 HISTORIO EN EKZILO.
 LA DOMO SITUAS EN LA 2-A ETAĜO.

La Domo ne havas neniun necesejoj nuntempe.
 Ĉi tiuj povas trovi pli longa, malsupren la ŝtuparon.
 Por tio, ni konsilas al vi uzi la instalaĵoj antaŭ aŭ
 post via vizito al la Domo. Ni pardonpetas
 pro la ĝeno.



Saluton Kara Legantaro !

Pro la abundaj jarfinaj agadoj, ni preskaŭ maltrafis iun neordinaran festivalon pri fanrevuoj («fanzinoj») kaj la budon de la asocio UDODUF kiu ankaŭ dediĉitis al Esperantaj revuoj. La festivalo okazis en Bruselo (ĉe «*Le Bunker Cine-Theâtre*») kaj kiel kutime nomiĝis komike. Pasintajn fojojn, ĝi titoliĝis : «8a Transalpina Fanrevu-gregmigrado», «237a Interplaneda Fanrevu-festivalo», ...

Sed, ankaŭ konata kiel **adeptogazeto** kio estas fanrevuo? Ĝi estas libera kreaĵo, ĵurnale aŭ revue, farita de pasionataj (amatoraj) ŝatantoj pri ... io ajn : rokmuziko, politiko, feminismo, bildstrio, kino, ktp ... Fanrevuoj senpagas aŭ tre malmultekostas. Ili vivas sen veraj komercaj celoj, nur por disvastigi pasion aŭ tutsimple ĉar ne eblas eldonigi tiajn revuojn laŭ la komercaj vojoj

Unaj fanzinoj naskiĝis al komenco de la jaroj 1930 en USN por eldoni sciencfikciaĵojn sed vere populariĝis dum la hipipia epoko, laŭ la «*Do it yourself*»-a menso de Jerry Rubin.



Poste, punkoj reprenis la fanrevuo-agadon. Lastatempe, kiam ekaperis la movado de la «*indignados*» en Hispanio, fanrevuoj ŝajnas reaperi pliforte eĉ Esperante, dank'al komputiloj kaj interreto kiu ĝuste permesas renkontigi talentajn fanrevuistojn en festivaloj.

Elkore ni salutas tiun iniciativon !

<http://fanzinorama.canalblog.com/>

Ni deziras bonan vojaĝon al vojaĝontoj, bonan restadon al la aliaj kaj al ĉiuj varman someron !

Laur' kaj Samy
aktuala@esperantobruselo.org




Enhavo

Paĝo 2 :	La Semo / Voĉoj de la Tempo
Paĝo 3 :	Kolofono kaj Agendo
Paĝo 5 - 6 :	Vojaĝo per biciklo
Paĝo 7 - 9 :	La 65a IFEF Kongreso
Paĝo 10 :	Unueca lingvo
Paĝo 11 - 15 :	Amikejo, la Esperanto-lando ...
Paĝo 16 - 19 :	La movado en Indonezio
Paĝo 20 :	Festo-reklamo



Vojaĝo per bicliklo tra la mondo de Cirilo kaj Roz'




Monako

(3/4 -> 6/4/2009 - 28 km => 1871 km)

▷ Vendrede je la 16-a horo. Ni apenaŭ alvenis en la princolando, kiam jam atendas nin la ĵurnalistoj de la monata informrevuo "l'Observateur de Monaco". Post la intervjuo, ni estigos tre interesan babiladon pri informlibereco eksterlande kun Martin, la ĉefredaktoro de la revuo. Tiam alvenas Stéphane, nia monakana gastiganto por tri noktoj. Li petveture rondvojaĝis tra Eŭropo dum 11 mois cele viziti la Unesko-lokojn. Kun sia kunulino Christine, li disponigas al ni sian apartamenton. Li ankaŭ zorge informis la lokajn inforcentrojn.

Sabate, li kondukas nin ĉirkaŭ Monako. Ni iras al Eze, grava loko pri kreado de parfumoj, kun supervido al Monako, kaj poste al Roquebrune, kie staras olivarbo 2000-jaraĝa. Estas bele skribi sur vivrecenzo de biciklista vojaĝanto, ke oni gastigis lin en Monako kaj ni tre kontentas. Ni tamen spertos malkonfortajn noktojn... malgraŭ la loka kvieteco. Kiam li revenis de Parizo, Cirilo forgesis nian privojaĝan USB-memorilon. Ĝi estas nepre bezonata kaj ĝia nomo neniam tiom trafis, ĝi ja estas la memoro de nia vojaĝo! Post

multaj telefonvokoj jam ekde ĵaŭde matene, la tagon kiam ni foriris de Saint-Raphaël, geonkloj de Cirilo tuj iris al lia apartamento por poŝte sendi la memorilon per spurebla letero. Ni nun trankviliĝis. La sekvan matenon ni ne maltrankviliĝas. Ni vizitas Nicon matene kaj atingas Monakon vespere. Sen multe esperi, ni kontrolas perrete. La spurebla letero estis poŝtita en Parizo, nenio pli... Normale devus aperi indikoj de ĉiuj trapasitaj lokoj.



▷ Ĉu ĝi ankoraŭ troviĝas en Parizo? Ĉu ĝi survojas? Ĉu ĝi perdiĝis aŭ, eĉ pli aĉe, estis ŝtelita? Ni ĉion imagas. Ni ne povas daŭrigi la vojaĝon sen ĝi. Ni tiam ekkonsideras la eblon ke Cirilo retrajnu Parizen por aĉeti novan kaj transmeti savkopion en ĝin. Ni rigardas la biletprezojn de trajnoj kaj aviadiloj... por se okaze necesos... Sabate, Roz' iras al la poŝtoŝtanco, en la ricevejo. Ŝiaj kolegoj afable akceptas ŝin sed, ve, neniun spuron de nia memorilo en la poŝta softvaro. Ankaŭ nenio en la angulo de spuritaj kaj registritaj leteroj...



Gardistara ŝanĝo ĉe la princa palaco

Dimanĉe, daŭre nenio en Interreto. Kien damne malaperis ĝi? Ni serioze planas la revenon Parizen de Cirilo, plene konsciante pri la konsekvencaj kostoj. 200 eŭroj por la vojaĝo plus la prezo de nova memorilo. Ni tre ĉagrenas. Ni plian fojon ne plene trankvile dormos ĉi-nokte. Ni iomete ŝanĝas niajn pensojn per vizito de Monako, kiu tre agrablas ĉi-sezone kun ankoraŭ malmulte da turistoj. Ni spektas la gardoŝanĝadon antaŭ la princa palaco kaj ni bicikle promenas en la aliaj kvartaloj de tiu urbŝtato granda je nur 3 km longe kaj 1 larĝe sed kiu tamen membras en la Unuiĝintaj Nacioj.

Ni do disponas sufiĉan tempon por renkonti la ĵurnalistojn de Monaco Matin,

kiuj interesiĝas je nia aventuro, same kiel je la lingvo internacia Esperanto.



En la ĵurnalo Monaco Matin

Lunde matene, je 7h30, Roz' denove iras al la poŝtoŝtanco. Daŭre nenio. Ŝi atendas la alvenon de la respondeculo pri la lateralvenejo, pluraj spureblaj leteroj videblas... sed ne la nia. Post pliaj priserĉoj, la letero estas trovata, ĝi ĵus alvenis. Roz' estas trankviligita, Revenante al nia gastigloko ŝi havas duan bonan surprizon, ŝi povas vidi nin en la ĵurnalo Monaco Matin. Ni poste kune biciklas al la kazino ĝardeno, kie televido atendas por filmi nian foriron al Italio. Ni tiam daŭre nenion scias pri la okazanta dramo en tiu lando.



Intervjuataj de ĵurnalistoj de la princa televido

(sekvena)

La 65-a IFEF-KONGRESO

Temo de la kongreso: Rolo de la fervojoj en la disvolviĝo de la moderna mondo

Ĝi okazis en la sudokcidenta parto de Francio de la 4-a ĝis la 11-a de majo 2013 en *Artigues près Bordeaux* (Artigues ĉe Bordoza) Samtempe kongresis UFE (Unuiĝo Franca por Esperanto). Esperanto harmonie kunigis la du asociojn. La aranĝojn partoprenis pli ol 250 geesperantistoj el 17 landoj. Al la kunorganizado multe helpis la ĝirondia Esperanto-grupo, kies prezidanto estas Bernard Sarlandie. Pri altkvalitaj kulturaj programoj en kiuj rolis ĉiuj grupanoj zorgis precipe Marcelo Redoulez kun Claudine Pomiról. Jam la nekutima interkona vespero donis imagon pri io eksterordinara. Kaj tiel efektive estis dum ĉiuj vesperaj kulturaj programoj. Multaj surprizoj atendis nin. Al interkoniĝo kontribuis per akordiona muzikado kaj E-kantoj la konata franca esperantisto FAMO.

En la dimanĉa solena inaŭguro honorigis nin la vicprezidanto de la ĝenerala konsilio Jean-Marie Darmian. La bonvenigon de la ĉeestantoj komencis la prezidantino de LKK (Loka Kongresa Komitato) Sylviane Lafargue. Salutis Rodica Todor - la prezidantino de IFEF, Claude Nourmont - la vicprezidantino de UEA, Bernard Sarlandie - la prezidanto de ĝirondia E-grupo, Stefan Mac Gill nome de ILEI. Sekvis kantado de E-himno kun akordiona akompano de FAMO. Post la paŭzo komenciĝis salutado de ĉiuj reprezentantoj de ĉeestantaj landaj asocioj, kaj oni legis ret-alvenintajn bondezirojn de gravaj organizaĵoj kaj unuopuloj. Inter kiuj ankaŭ tiu de Probal Dasgupta la prezidanto de UEA. Antaŭ la fino Rodica Todor honorigis kaj transdonis diplomojn al Jeannine Daguin, Bernard Sarlandie kaj Marcelo Redoulez pro ilia meritplena laboro por

Esperanto. Post la tradicia komuna fotado ĉiuj estis invititaj al aperitivo okazanta antaŭ la restoracio. Sunbrilo aperis sur ĉiuj vizaĝoj.

Dum la semajno okazis fakaj prelegoj, komitat-kunsidoj, diversaj labor-kunvenoj, oni pritraktis movadajn aferojn, prezentis novaĵojn el fervoja mondo. Kundiskutis terminara komisiono, okazis ILEI sesio pri la projekto de E-kurso ne nur por fervojistoj. Tre allogaj estis la prezentoj de la venontaj IFEF-kongreso en Italio kaj tiu de UEA en 2015 en Lillo. Oni spektis filmon pri Esperanto kaj mallongan humuran desegno-filmeton "La bariergvardistino". Daniel Moirand tre lerte rakontis pri "Mil kaj unu noktoj". Stefan Mac Gill prelegis pri "Rolo de la fervojo en moderna mondo", Michel Lafosse tre kompetente kaj detale prelegis pri "Bordoza tramo". Lia prelego kompletigis antaŭan viziton de kelkaj interesuloj al la tram-prizorgejo. Ili konstatis grandan similecon kun trajn-riparejo. Robert Combes kun sia edzino prezentis bildojn pri la konstruado de la "Viadukto des Fades", nuntempe jam ne funkcianta. Mireille Grosjean parolis pri "Japanaj trajnoj", Andrej Grigorjev el Kramojarsk pri "Siberia fervojista sindikato", Pjer Buvje pri la "Unua libro kaj la Bona Lingvo", Marcelo Redoulez pri "Bordoza Maskeronoj". Bone funkciis libroservo, okazis ekumena Diservo. La prezidanto de la ĝirondia E-klubo Bernard Sarlandie kontaktis ĵurnalistojn kaj oni aperigis artikolojn pri Esperanto. Aperis tri numeroj de kongresa bulteno. Estis reelektita la ĝisnuna estraro por trijara periodo. Ankaŭ UFE elektis kaj prezentis novan estraron kaj pridiskutis siajn movadajn aferojn.



INTERNACIAJ KONGRESOJ
de FERVOJISTAJ ESPERANTISTOJ

1. BANGOR 1904	16. BOSTON 1910	31. TORONTO 1916	46. CLEVELAND 1922	61. BANGOR 1928
2. BRUXEL 1905	17. KAJAR 1911	32. ANKARA 1917	47. KHEMS 1923	62. PARIS 1929
3. PARIS 1906	18. BUCAREST 1912	33. BERLIN 1918	48. DEN HAAG 1924	63. POZNAŃ 1930
4. LINDAU 1907	19. SUDA 1913	34. AMSTERDAMO 1919	49. TRIESTE 1925	64. TRIESTE 1931
5. BRNO 1908	20. KARNA 1914	35. BOSTONO 1920	50. KORO 1926	65. SOFIA 1932
6. BERONA 1909	21. ZAGABONO 1915	36. SINDRO 1921	51. KALINGO 1927	66. ANTWERP 1933
7. BERNO 1910	22. BRNO 1916	37. VIENNO 1922	52. LE MANS 1928	67. BRNO 1934
8. STOKHOLMO 1911	23. MADRID 1917	38. SOFIO 1923	53. BUDAPESTO 1929	68. ANTWERP 1935
9. BRUXEL 1912	24. SUDA 1918	39. KAJAR 1924	54. TIBORO 1930	69. ANTWERP 1936
10. BRUXEL 1913	25. MADRID 1919	40. ZAGABONO 1925	55. PLOVDIVO 1931	70. ANTWERP 1937
11. LINZO 1914	26. TABRAGONO 1920	41. SINDRO 1926	56. DRESDENO 1932	71. ANTWERP 1938
12. HELSINKI 1915	27. ZAGABONO 1921	42. SUDA 1927	57. SODRO 1933	72. ANTWERP 1939
13. BRUXEL 1916	28. MADRID 1922	43. SUDA 1928	58. SODRO 1934	73. ANTWERP 1940
14. BRUXEL 1917	29. MADRID 1923	44. SUDA 1929	59. SODRO 1935	74. ANTWERP 1941
15. BRUXEL 1918	30. MADRID 1924	45. SUDA 1930	60. SODRO 1936	75. ANTWERP 1942

La 65-a IFEF-KONGRESO en ARTIGUES cĉe BORDOZO




4a -11a Majo 2013




La bordozaĵaj maskeronoj



En mia trajno - Zuf!
mi rapidegas tra la land!
Kaj la sonojn de la masino
superbruas mia kant!
Ĉiun semajnon - Zuf!
vendrede tuj post la labor!
Mi vekas la lokomotivon
kaj baldaŭ poste mi iras for




Fajfu, jen la vivo!





UNUECA
MERKATO,
unueca mono, ĉu
unueca lingvo ? La
pordoj kaj la
pontoj, kiuj ilustras
la eŭropajn
monbiletojn, jam
enkarnigas la

fluecon de la interŝanĝoj inter komercantoj sen ankriĝo kaj sen historio. Ĉu ankaŭ necesas, ke la studentoj povu forlasi sian landon sen vortaro ? Kun flughavena angla kiel lingva pasporto, uzebla ĉie, speciale en la francaj universitatoj. Ĉar tiuj restis ankoraŭ tro longe „*miskongruaj*” - kiel la cetero de la lando. Imagu, tie oni daŭre parolas ... la francan ! S-ino Geneviève Fioraso, ministro pri supera edukado kaj pri esplorado, volas forigi tiun „*lingvan obstaklon*” kiu senkuraĝigas „*la studentojn de la sojlojlandoj, Koreio, Barato, Brazilo*” veni por studi en Francio.

Dudek naŭ ŝtatoj havas tamen kiel oficialan lingvon tiun de Moliero (kvindek ses tiun de Ŝekspiro). Kaj la nombro de francparolantoj ne ĉesas kreski, speciale en Afriko. [1] Sed, se juĝi laŭ la dorna vojo kiun tiu lingvo trudas al ili, la studentoj de tiu kontinento ne estas tiuj, kiujn Francio volas allogi. Ne sufiĉe riĉaj, ne sufiĉe kapablaj pagi la (altajn) aliĝkotizojn por komerca aŭ inĝeniera altlernejo.

En la usonaj universitatoj, kie la proporcio de eksterlandaj studentoj (3,7 elcentoj) restas tre malalta kompare kun tiu de la francaj institucioj (13 elcentoj), neniu havis la ideon ripari tiun „postrestadon” per instruado en la ĉina aŭ la portugala. „*Se ni ne permesas la lecionojn en la angla, ni troviĝos kvinope ĉirkaŭ la tablo diskutante*

pri Proust”, tamen ironiis s-ino Fioraso. S-ro Nicolas Sarkozy montris sian malestimon al la klasikaj studoj per tio ke li bedaŭris la studentojn kondamnitajn legi *La Princesse de Clèves* anstataŭ studi juron aŭ komercon.

La leĝo Toubon, voĉdone decidita en 1994, dispozicias, ke „*la lingvo de instruado, de la ekzamenoj kaj konkursoj, same kiel tiu de la disertacioj kaj raportoj en la publikaj kaj privataj institucioj estas la franca*”. Malamikaj al tiu regulo, „*kiu devenas el la lasta jarcento*”, manpleno da prestiĝaj universitatoj pretendas, ke la defendo de multlingvismo (ankoraŭ vigla, en tiu ĉi jarcento, en la plej multaj internaciaj organizaĵoj ...) malinstigas la parolantojn de la angla veni por studi en Parizo.

Sed la „logeco” de lingvo ne resumeblas per la vendo de studlokoj al „sojlojlandoj”. Ĝi devenas el maniero interkomunikiĝi kun aliaj, pensi la mondon, inkluzive de tiu kiu venos. Ĉu Francio, kiu batalis por defendi sian kinartron kaj siajn kanzonojn, povas akcepti ke iun tagon la esplorado kaj la scienco esprimiĝos *ekskluzive* en la lingvo, ofte mistraktata, de la plej potenca ŝtato ?

„*Hodiaŭ, notas la lingvisto Claude Hagège, la paradokso estas, ke la usonigo, la disvastigo de la angla, estas io, pri kio taskas sin aliaj ol la usonanoj.*” Bonŝance, aliaj ol la francoj – speciale en Afriko kaj en Kebekio – ebligis al la kultura diverseco prosperi. Ilia persistemo meritis ke ĝi inspiru la politikajn respondeculojn pli ol la totalisma fatalismo de manpleno da universitatoj.

Serge HALIMI

[1] S-ro **Laurent Fabius**, franca ministro pri eksterlandaj aferoj, uzas la kutimajn kalkulojn kaj taksas, ke „*80 elcentoj de la francparolantoj de 2050, do 700 milionoj da homoj, estos afrikanoj*”.

Amikejo: la Esperanto-lando kiu preskaŭ ekzistis

► Nun koncentru vin, kaj helpu vin per la apuda mapeto, ĉar nun iĝas komplike! Pro la revolucio la Malsupraj Landoj estis dividitaj en Belgion kaj Nederlandon, kiun lastan oni do ofte nomas Holando, kvankam Norda kaj Suda Holando verdire nur estas du el la nunaj 12 provincoj de Nederlando. Luksemburgo estis dividita en okcidentan Franclingvan parton, kiu fariĝis parto de Belgio, kaj orientan Germanlingvan, kiu restis en persona unio kun Nederlando ĝis 1890 kaj en dogana unio kun Germanio ĝis la unua mondmilito. La plej sudorienta Nederlanda provinco Limburgo estis dividita, tiel ke la okcidenta parto fariĝis Belga. La orienta parto iĝis, kompanse por la perdo de okcidenta Luksemburgo, duklando sub la Germana Federacio en persona unio kun Nederlando. Limburgo tamen iĝis parto de la Nederlanda reĝlando en 1867.

Ĉi tiu tuta tohuvaĵo (kaj la Germana-Franca milito 1870-72) lasis nian malgrandan enklavon tute netuŝita, krom ke la Malsupralanda administrado de Neŭtrala Moresneto transiris al Belgio. Ekestis la kuriozaĵo de kvarlanda punkto tie kie kuniĝis la limoj inter Nederlando, Belgio, Germanio kaj Neŭtrala Moresneto. Tiu punkto (sur la monteto Vaalserberg) estas samtempe la plej alta punkto en Nederlando kun 322,7 metroj super la maro – sufiĉe multe pli ol la tri proksimume 170-metraj altaĵoj en orienta Jutlando, kiuj konkuras esti la plej alta de Danio. La kvarlanda punkto ankoraŭ hodiaŭ troviĝas sur la sama loko, nur reduktita al trilanda punkto. Ĝi daŭre estas turista allogaĵo, precipe por Nederlandanoj, kiuj ĉi tie estas bonvenigataj per filmeto en la loka dialekto.

La vivo en Kelmis

Loĝado en neŭtrala regiono havis certajn avantaĝojn. La mineja kompanio (*Société des Mines a Fonderies de zinc de la Vieille Montagne* en Lieĝo) estis ĉiosuperrega, sed sociale respondeca dunganto, kiu funkciigis ankaŭ bankon, hospitalon, luigadon de loĝejoj kaj kelkajn butikojn. Importado estis sendogana, impostoj kaj prezoj estis pli malaltaj kaj la salajro pli alta ol en la najbaraj landoj. La loĝantaro dekobliĝis de 256 en 1816 ĝis 2.572 en 1858. El tiuj estis 695 naskitaj en la neŭtrala regiono, dum 852 estis Belgoj (supozeble plejparte Franclingvaj), 807 Prusoj, 204 Nederlandanoj kaj 14 devenis el aliaj lokoj.



Unu el la multaj bildkartoj eldonitaj pri Moresneto kaj la kvarlanda punkto

La malavantaĝoj estis malpli konkretaj kaj precipe temis pri tio ke oni ne povis influi la evoluon. La neŭtralan regionon administradis urbestro, kiun nomumis du komisaroj, unu Prusa en Aĥeno kaj unu Belga en Verviers. Post kiam la urbestro estis nomumita, li praktike estis absoluta reganto.

Depost 1859 li elektadis 10 membrojn al konsilantaro, sed la loĝantoj neniam ricevis la rajton baloti aŭ membri en sindikato. Origine estis ankaŭ neniuj militservoj, ĉar sur la tereno devis troviĝi neniam da militiloj, sed ekde 1854 la Belgaj loĝantoj estis alvokataj al la nacia armeo, kaj ekde 1874 same okazis al la Germanaj.

Ĉar estis neniuj kortumoj en Kelmis, juraj konfliktoj estis decidataj de Belgaj aŭ Germanaj kortumoj; pri tio oni povis mem elekti! La verdiktoj estis decidataj laŭ *la Napoleona kodekso*, ĉar tiu estis la valida kiam oni difinis la limojn. La Napoleona kodekso estis modelo en la leĝdonado de la 19-a jarcento, sed neniuj leĝdona povo havis la kompetenton ŝanĝi ĝin, kaj ĝi enhavis tre severajn punregulojn; ekzemple ŝtelo de malplena sako povis rezultigi unu jaron da punlaboro! La observigo de la leĝo estis tamen treege indulga, kaj kaŝdrinkejoj kaj hazardludejoj abundis. Okazis vigla kontrabandado de impostitaj varoj, precipe hejme distilitaj alkoholaĵoj (ofte en boteloj etikeditaj kiel "Altenberga Minerala Akvo"), sed ankaŭ kafo, viando, eĉ salo.

Ĉi tiu kvazaŭlandeto, nur je kvarono pli granda ol Monako, iom post iom evoluigis al si tute propran identecon. Jam en 1848 oni stampis kelkajn lokajn monerojn, kvankam la sola leĝa pagilo estis la Franca franko (kvankam oni kompreneble senĝene uzadis kaj Belgajn frankojn kaj Germanajn markojn). En 1883 oni ekhavis la ideon fari propran flagon, horizontalan trikoloron en nigro, blanko kaj bluo. En 1885 la zinkominejo estis elĉerpita, tiel ke la enloĝantoj komencis cerbumi kiel ili certigu ekonomie sian apartan statuson. En 1903 oni provis leĝigi kazinon, sed tio igis la Prusan reĝon minaci ke li donacos la tutan regionon al Belgio, do oni baldaŭ rezignis pri tio. Sed la neŭtraluloj, kiel multaj lokanoj

ankoraŭ hodiaŭ fieras nomi sin, estis optimistoj kaj ne facile senesperigis.

Wilhelm Molly kaj esperanto



D-ro Wilhelm Molly (1838-1919)

La plej rimarkinda personeco en la historio de Neŭtrala Moresneto estas d-ro Wilhelm Molly. Li alvenis el Wetzlar en Heslando en 1863 por praktiki kiel kuracisto kaj baldaŭ populariĝis pro siaj tre indulgaj prezoj. Foje li preventis ĥoleran epidemion, kaj de tiam lia populareco havis neniam limojn. Belgio kaj Prusio superŝutis lin per ordenoj, la zinka minejo dungis lin kiel kompanian ĉefkuraciston, kaj la urbestro nomumis lin vicurbestro.

Wilhelm Molly havis multajn interesojn, interalie li estis fervora filatelisto. Li ekhavis la ideon ke Moresneto havu propran poŝton, do li fondis la asocion *Kelmiser Verkehrs-Anstalt zu Neutral Moresnet* (Kelmis-a Trafika Societo de Neŭtrala Moresneto), kiu eldonis en 1886 siajn proprajn poŝtmarkojn, simile al la privataj

poŝtaj kompanioj tiutempe konataj en iuj Prusaj urboj. Tamen laŭ la Napoleona Kodekso poŝto estas ŝtata monopolo, do al ĝi la komisaroj baldaŭ metis finon.



La poŝta iniciato ĉiuokaze restas malgrava kompare al lia klopodo por fari el Neŭtrala Moresneto Esperanto-ŝtaton! La ideon li ricevis de Gustave Roy [gistáv rŭa], franca lingvoinstruisto loĝinta kelkan tempon en Aĥeno. Reveninte al St. Giron en suda Francio, Roy eksciis pri Esperanto, verŝajne pro la unua UK en 1905. Li tuj faris la koneksojn: La neŭtrala, internacia lingvo Esperanto estus la plej konvena afero ĝuste por la malgranda enklavo ĉe Aĥeno, kunpremita inter tri landoj kaj tri lingvoj. Somere de 1906 li reiris al Moresneto kaj vizitis Wilhelm Molly. La kontakton sendube helpis ke ambaŭ viroj kolektadis poŝtmarkojn kaj estis framasonoj.


La nomo de la nova ŝtato estos "Amikejo". Unue la du viroj organizas mitingon en la halo de la pafista asocio, la kutima kunvenejo de la ministoj.

Ĝi okazas somere aŭ aŭtune de 1907; la ekzakta dato ŝajne estas forgesita, sed ĝi markis la komencon de vera Esperantoentuziasmo en la regiono de Kelmis. En Franclingva broŝuro eldonita komence de 1908, titolita *Projet réalisable en six mois d'un état espérantiste indépendant* (Projekto de sendependa Esperantista ŝtato realigebla en ses monatoj), Gustave Roy skizas siajn viziojn de nova, mondskala Hansa ligo kun

centro en Amikejo. Ĉu deliro? Li skribas mem: "Mi scias ke ne kredos eĉ unu el mil ke eblos la efektivigo de ĉi tiu projekto. Sed antaŭ nur dek jaroj eĉ ne unu el miliono kredus la efektivigon de sendrata telegrafio."



La monda gazetaro estas per informoj pri la plano.




Fondo de "Amikejo"

Foto el la fondo de Amikejo, 1908. Fronte, kiel dua maldekstre de la aŭto, videblas Wilhelm Molly.

La 13-an de Aŭgusto 1908 la Esperantoŝtato Amikejo do estas proklamota en granda festo. Preskaŭ 100 eksterlandaj esperantistoj alvenis por levi la etoson ankoraŭ pli. Oni eldiras paroladojn pri la nova ŝtato, kaj dum la paŭzoj muzikas la ministra fanfaro. Estas ceremonie prezentataj la flago kaj blazono de Amikejo. Fine ĉiuj kantas "O Altenberg!", poemo verkita por la okazo laŭ la konata melodio "O Tannenbaum".

Sed denove, kiom laŭvorte oni prenu tion? Karl Schriewer opinias ke oni komprenu la aferon plejparte simbole, sed Molly kaj Roy ŝajne vizias efektivan liberigon el Belgio kaj Germanio. Jam tri tagojn poste Roy iras al Dresdeno por realigi plian frapon. Nome tie okazas la kvara UK, en kiu Universala Esperanto-Asocio estas fondota. Oni intencis ke la ĉefoficejo havos lokon en Ĝenevo, sed kial ne meti ĝin en la same centran kaj neŭtralan Amikejon?



Raporto al UK 1908

La raporto de Gustave Roy al la UK, trovita ĉe Johano NL

En Dresdono renkontiĝis 1500 esperantistoj el 40 landoj. La 21-an de Aŭgusto la projekto de Roy estis sur la tagordo, kaj ĝi renkontis same fervoron kiel kritikon. Kelkaj opiniis ke ne necesas formi sendependan Esperantistan ŝtaton, kaj multaj estis nervozaj pri ĉio ajn interpretebla kiel io politika aŭ religia. Unu diris ke Esperanto detruigos se ordinaraj homoj ĝin parolos ĉiutage, sed la plej multaj ŝajne vidis nenian problemon en tio. Oni faras voĉdonon, kaj ĝi rekomendas la proponon de Roy.

Sekve en Kelmis Karl Schriewer estas nomumita kiel delegito por UEA, kaj li tuj komencas instali la oficejon de la asocio. Nun oni nur atendas la reprezentantojn de Ĝenevo, kiuj anoncis sian alvenon fine de la jaro. Oni atendis ilin senrezulte, sed la etoso estis simple tro alta por lasi sin seniluziiĝi. Oni laŭplane okazigas grandiozan feston en Amikejo la 27-an de Decembro 1908. Partoprenas 150 esperantistoj de diversaj landoj, oni prezentas teatraĵojn kaj poemdeklamojn en Esperanto, kaj oni kantas la himnon de Amikejo, laŭ la melodio de "la Espero". La

kanto estas eksplicite dediĉita al la senlaca delegito Karl Schriewer.

Sed en 1909 Schriewer devis soldatiĝi, kaj kvazaŭ tute malaperis la animo de la entrepreno. La asocio Amikejo daŭrigis siajn aktivecojn, sed ĉiam pli kiel tute ordinara okcident-eŭropa dormema, loka Esperantogrupo – ne plu teatraj prezentadoj, ne plu instruado de infanoj. En tuta Eŭropa la esperantoptimismo iom malfortiĝis, kaj tio ŝuldiĝis precipe al la tiel nomata Ido-skismo, kiu aparte forte batis Belgion kaj Luksemburgon.

Reforma tumulto kaj stabiliĝo



Tramo en Kelmis

Cetere, pri flankaj trakoj, iris unu tia de Belga Moresneto al la zinka minejo. La trako poste estis plilongigita laŭ la ŝoseo ĝis Aĥeno kaj uzata por tramo trafiko. La linio ne plu ekzistas.

Ido estas reformo de Esperanto kiun en 1907 anonime proponis la efektive memproklamita "Delegacio por Alprenado de la Lingvo Internacia". Al multaj el la okcident-eŭropaj esperantistoj, precipe la edukitaj, Esperanto estis parto de progresismo kiu povas impresi iom naiva hodiaŭ. Precipe la fama dana lingvisto Otto Jespersen estis konvinkita ke ekzistas ia "progreso en lingvo". Laŭ tiu pensmaniero, ne nur la pli novaj lingvstrukturoj ĝenerale estas pli bonaj perantoj de la penso ol la pli malnovaj, sed ankaŭ konscia lingvoplanado povas rezultigi ion alian kaj pli valoran ol egaligo de dialektoj.

Jespersen estis sufiĉe sola kun tiu vidpunkto inter siaj kolegoj, kaj ĝi neniam akiris sciencan subtenon. Sed estas evidente ke ĝi povis havi allogon al iuj esperantistoj, precipe en tempo kiam ne estis politike malkorekte distingi inter pli kaj malpli evoluintaj lingvoj kaj kulturoj.

Pensige estas ke nur tre malmultaj el la “piedsoldatoj” de la Esperanto-armeo “dizertis” favore al Ido, dum estis pli granda nombro da “generaloj” – kaj ke la ribelo ne okazis en tempo kiam Esperanto estis premata, tute male ĝi floris kiel neniam antaŭe. Okazis al Ido tio kion oni povus antaŭdiri: la provo daŭre perfektigadi la lingvon per dekretoj ne kondukis al progreso, sed nur al malstabileco.

Intertempe Otto Jespersen ostaĝiĝis al sia propra ideologio, kaj ne havis alian elekton ol dizerti la duan fojon en 1928 kun sia propra projekto “Novial”, kiu mortis kun li mem en 1943.

La plej elstara Esperantisto en Belgio estis la fama esplorvojaĝanto Charles Lemaire, kiu interalie eldonis La Belgan Sonorilon. En tiu revuo li dum 1908 tiom agitadis por lingvoreformoj ke Belga Ligo Esperantista fine distancigis sin al li. Lemaire tiris multajn kun si al Ido, sed poste tute disreviĝis. La Esperanto-grupo de Luksemburgo estis la sola kiu tutece aliĝis al Ido, kaj karakterize estas ke Luksemburga Esperanto-Asocio estis refondita nur en 1971, kvankam ankaŭ intertempe estis Esperanta aktiveco en la lando, kaj Ido tiam estis delonge forgesita. Plu ekzistas malgranda internacia Ido-asocio, sed ĝi havas neniujn delegitojn en Luksemburgo, Belgio aŭ Danio.

La skismo estis grava skuo al la Esperanta komunumo, sed en la longa daŭro estis avantaĝo elpurigi la reformistojn. Estas realeca takso ke la ceteraj planlingvoj kune havas malpli ol unu procenton de la

parolantaro de Esperanto.

La vere pensiga fakto tiurilate estas ke apenaŭ iu lingvoteorio kapablas kolekti same grandan plimulton da lingvistoj; precipe estas grava dislimo inter tiuj kiuj rekte aŭ nerekte bazas sin sur Ferdinand de Saussure, kaj tiuj kiuj orientiĝas laŭ Noam Chomsky. Alivorte, estas preskaŭ nenia dubo ke esperanto estas *la* internacia lingvo, dum estas tre malfacila kia afero entute estas lingvo. Laŭ tiu vidpunkto Esperanto havas konsiderinde pli multe da prestiĝo ol lingvistiko.

La mondmilitoj kaj la postmilita tempo



La kovrilpaĝo de la notoj de la pacmarŝo de Huppermann

Sed tio estis flanko trako. En Amikejo la reforma bacilo neniam ĝenis homojn, sed la 1-a mondmilito tiom pli. Ĝi estis speciale kruela al la miksdevene Belgaj-Germanaj(-Nederlandaj-neŭtralaj) familioj en Kelmis. Unu el la junaj viroj kiujn la Belga armeo vokis al la batalkampoj, dum lia bofrato devis servi en la Germana flanko, estis la muzikisto Willy Huppermann.

(sekvenda)

La movado en Indonezio reviviĝas

Dum la ĵusa Indonezia Esperanto-kongreso estis fondita landa Esperanto-asocio. La kongreson ĉeestis reprezentanto de la ministerio de eksteraj aferoj, kiu diris, ke oni proponos kurson de Esperanto al indoneziaj diplomatoj. Ni intervjuis Heidi Goes, kies instruvojaĝoj kondukis al la de la movado.



Heidi Goes: – Jes, mi havas tie tri patrinojn, kaj bedaŭrinde nur du patrojn, ĉar unu jam forpasis. Mi loĝis tie dum unu jaro, per kultura interŝanĝprogramo, tuj post la mezlernejo en la lerneja jaro 1994-95.

Libera Folio: Kaj poste vi revenadis kelkfoje?

Heidi Goes: – Nur en 2004 mi revenis la unuan fojon. Post mia jaro en Indonezio mi ekstudis en universitato kaj akiris tri diplomojn, ĉar mi volis studi pli kaj pli. Kaj intertempe mi ankaŭ naskis mian filon kaj ne multe povis vojaĝi. Kiam mi ja vojaĝis, tiam al Afriko, ĉar miaj studoj temis pri Afriko.

Libera Folio: Kiam vi lernis Esperanton?

Heidi Goes: – En 1990.

Libera Folio: Kiam vi ekhavis la ideon kombini Esperanton kaj Indonezion?

Heidi Goes: – Mi verkis mian disertaĵon pri Esperanto en Afriko. Jarojn poste UEA petis min reverki ĝin en Esperanto por eldoni libroforme. Tio estis en 2006, mi faris tion, ĝi eldoniĝis en 2007, kaj por tiu reverkado mi faris esplorojn en bibliotekoj kaj arkivoj. Mi tiom ŝatis la esploron, ke mi volis tuj havi novan temon. Do mi elektis Indonezion, ĉar mi konas ĉiujn fontolingvojn - Esperanton, la nederlandan kaj la indonezian. Malmultaj aliaj povus kaj volus fari tion. Kaj en tiu tempo oni aŭdis tre malmulte pri Esperanto en Indonezio,



La Indonezia kongreso

En la iama nederlanda kolonio Indonezio ekzistis relative aktiva Esperanto-movado, kiu tamen preskaŭ estingiĝis en la 1960-aj jaroj. Post kelkaj instruvojaĝoj de la belga esperantisto Heidi Goes en la lastaj jaroj reaperis ĝermoj de movado. Ŝi estis multfoje intervjuata en indoneziaj amaskomunikiloj, faris lecionojn en universitatoj, kaj dum ŝia lasta vojaĝo okazis sukcesa Indonezia Esperanto-kongreso.

Heidi Goes estis unu el la prelegantoj dum la malferma tago en la Centra Oficejo de UEA fine de aprilo. *Libera Folio* kaptis la okazon por intervui ŝin pri la evoluoj en Indonezio.

Libera Folio: Ĉu vi havas personan rilaton al Indonezio?

do mi pensis ke ne estas multo por eltrovi, eble sufiĉe por unu artikolo.

Libera Folio: Ĉu temis pri universitata studo aŭ privata iniciato?

Heidi Goes: – Estis mia propra ideo, mi simple tiom volis esplori ion, kaj pensis ke la temo estas facile superrigardebla. Mi komencis esplori ĉi tie en la Centra Oficejo la tagon post la malferma tago en junio 2007, kiam mi prezentis mian libron. Dum ĉirkaŭ du jaroj mi esploris en bibliotekoj, kaj mi vidis, ke fakte estas multe pli da materialo ol mi pensis.

– Vere estis forta movado en Indonezio antaŭe, sed ekde 1962 estis multe malpli, kaj post 1965 mi trovis nenion plian pri tiu epoko. Mia unua penso estis, ke tio estis pro la forpaso de Datoe Toemenggoeng, kiu vere estis la motoro de la movado en Indonezio ekde 1950, kaj ŝi forpasis en 1962. Sed intervjuante indoneziajn veteranojn en Indonezio, mi malkovris ke la plej grava kaŭzo de la malapero de la movado estis politika.

– Post nesukcesinta puĉo la 30an de septembro 1965 la reĝimo ekpersekutis komunistojn, ĉinojn, kaj ĉiujn kiuj estis iom maldekstraj. Multaj esperantistoj estis ĉindevenaj, kaj ĉinoj ne plu rajtis kunveni. Plie, ili ankaŭ ne plu kuraĝis kunveni kaj eĉ foje bruligis siajn korespondaĵojn el Ĉinio kaj orienta Eŭropo por ke ne estu troveblaj spuroj de kontakto kun komunismaj landoj. Oni cetere ne devis estis komunisto por esti murdita. Multaj homoj kaptis la okazon por murdi delongajn malamikojn (vidu pli pri tio en [Wikipedio](#)). Esperanto-revuoj el komunismaj landoj, kiujn la indoneziaj esperantistoj ricevis, ne plu rajtis eniri la landon.

Libera Folio: Kiel vi ekhavis la ideon denove veturi al Indonezio kaj instrui tie Esperanton?

Heidi Goes: – En aprilo 2009 mi ricevis mesaĝon de Internacia Vegetarana Unio, IVU, pri azia vegetarana kongreso okazonta en la insulo Batam en Indonezio. Mi pensis, ke ĉar mi jam kvin jarojn ne estis en Indonezio, kaj ĉar mi volas esplori Esperanton en Indonezio, mi kombinu la aferojn kaj veturu al la kongreso.



– Dum la Universala Kongreso en Bjalistoko mi parolis pri tio kun Lee Jung-kee, kiu tiam estis la prezidanto de KAEM, la komisiono de UEA pri la azia Esperantomovado. Li proponis ke mi ankaŭ instruu Esperanton en Indonezio. Dum septembro kaj oktobro mi havis tempon aranĝi la aferon - por trovi interesiĝantojn mi kontaktis homojn per Facebook kaj per Couchsurfing kaj homojn kiujn mi jam konis. Tiam mi instruis dum tri semajnoj.





– Poste mi reiris en 2010, ĉar okazis monda vegetarana kongreso en Ĝakarto. Tiam mi denove kombinis la aferon kun instruado kaj revidis homojn kiuj jam lernis en la antaŭa jaro. Estis multaj novuloj, ne ĉiuj daŭrigis, sed estis almenaŭ sufiĉe por krei kelkajn klubojn. En la dua vojaĝo mi iris ankaŭ al du novaj urboj, al la dua kaj tria plej grandaj urboj de Indonezio.

Libera Folio: Kiom da homoj laŭ vi restis, do lernis Esperanton kaj ne tuj malaperis?

Heidi Goes: – Estas nun sume kvar vojaĝoj, sed pri la lasta ni ankoraŭ ne kalkulu. Do estas nur dekoj, kiuj vere daŭrigis, el eble pli ol mil, al kiuj mi enkondukis Esperanton. Ekzemple en unu universitato oni proprainiciate invitis min prelegi, ĉar unu profesoro interesiĝis pri Esperanto. Venis pli ol 200 homoj, sed oni kompreneble ne povas atendi ke ĉiuj ili daŭrigos. Tamen ili almenaŭ eksciis ion pri tio, kio estas Esperanto, kaj el ili kelkaj poste venis al la klubo.

Libera Folio: Vi ŝajne ricevis multe da atento en la amaskomunikiloj. Tio estas parte komprenebla, ĉar vi venas de forlando kaj tamen parolas la lokan lingvon, sed kio plia laŭ vi influis la interesiĝon?

Heidi Goes: – Helpas, ke ili fakte neniam aŭdis pri Esperanto. Estas io nova por ili. Allogas ankaŭ, ke estas io neŭtrala, kaj ke oni povas trovi per ĝi amikojn en eksterlando. Preskaŭ ĉiuj uzas Facebook,

kaj tre volas havi eksterlandajn amikojn tie. Ofte jam dum mia leciono ili komencas skribi vortojn en Esperanto en Facebook. Multaj kompreneble restas ĉe tiuj komencaj frazoj, sed kelkaj tamen daŭrigas.

Libera Folio: Lastatempe oni eksciis ke eĉ lernejo por indoneziaj diplomatoj interesiĝas pri Esperanto. Kion konkretan oni povas jam diri pri tio?

Heidi Goes: – La diskutoj ankoraŭ daŭras, sed Pribadi Sutiono, reprezentanto de la ministerio de eksterlandaj aferoj, kiu ĉeestis dum la malfermo de la Indonezia kongreso, diris dum la malfermo, ke la planata lingvolernejo de la ministerio de eksterlandaj aferoj havos ankaŭ kursojn pri Esperanto. Li poste ripetis tion al ĵurnalistoj.

– Li ankaŭ diris ke jam antaŭe estis interesiĝo pri Esperanto inter la diplomatoj en Indonezio, sed ke ilia fakulo pri Esperanto forpasis, kaj poste nenio plu okazis. La ĉefo de la persono, kiu fakte venis al la kongreso, mem interesiĝas pri Esperanto. Li blogis pri tio en 2011, kaj tiel mi trovis lin, ĉar ofte mi serĉas en la reto tekstojn kiuj mencias Esperanton kaj Indonezion. Montrigis, ke li estas gravulo en la ministerio, havas la rangon de ambasadoro. Li mem ne povis veni al la kongreso, sed sendis reprezentanton.



Libera Folio: Kian subtenon vi ricevis de la movado por viaj vojaĝoj?

Heidi Goes: – Por la unua vizito mi ricevis subtenon de Esperantic Studies Foundation, ĉar mi iris por esploro. Ankaŭ KAEM ĉiam subtenis, sed grandan parton de tiu mono mi fakte uzis por lerniloj kiujn mi disdonis. Por la lastaj du vojaĝoj plej granda parto de la subteno venis de individuaj esperantistoj.

Libera Folio: Kion plian laŭ vi povus fari la organizita movado, kaj unuavice UEA?

Heidi Goes: – Ili povus iom pli interesiĝi kaj doni konsilojn. KAEM/UEA ja parte subtenis finance, sed konsilojn mi ne ricevas, nek de UEA, nek de KAEM. Ili (UEA kaj KAEM) ja enmetas mian agadon en sian jarraporton. Mi esperas, ke la novaj estraroj de KAEM kaj UEA estos pli helpemaj tiurilate. Mi emfazu tamen ke la CO ja ĉiam estas helpema.

– Mi jesis al la demando de Lee Jungkee iri instrui en 2009, kvankam mi apenaŭ iam antaŭe instruis, kaj mi ja ŝatas fini aferojn, do ne lasi la aferon tiel senhelpe post komenco de instruado. Sed tio ne signifas ke mi tuj, konsentinte pri instruado, scias kiel fari ĉiujn sekvajn paŝojn ĉe ebla sukceso, ekzemple kiel landa asocio devas esti fondita, aŭ pri kio alia mi devas pensi, kiel ekzemple la trejnado de instruistoj. Feliĉe dum la kongreso en Bogor ĉeestis du spertuloj kiuj helpis pri la starigo de la asocio, sen ili mi ne estus sukcesinta.

– Nun daŭre restas multe da laboro. Homoj demandas pri ĉiuspecaj aferoj kiujn la asocio devus fari, sed ĝi ekzistas nur de kelkaj semajnoj kaj havas enorman laboron antaŭ ol ĝi povos vere ekfunkcii. Do mi ankaŭ petas iom da pacienco.

libera folio (redakcio)



MUZIK-FESTIVAL O

ESPERANTO

Ĝomart kaj Nataŝa **KIMO**

Kajto **KRIO DE MORTO** MARTIN

Kapriol'! **PLATANO**

Nikolin' **Jonny M** LEO

FESTO

Reveno al Amikejo

festo.jefo.fr

2013



Gaëtano

De la 10a ĝis la 18a de Aŭgusto
EN KELMISO

rue du Patronnage, 29 4720 La Calamine - Belgio

FOLK', ROK', REP', REGE', ... FESTO EN BELGIO, EN «AMIKEJO»!

Antaŭ iom pli ol unu jarcento, Kelmiso estis la urbo de la iam proklamita «Esperanto-Ŝtato» AMIKEJO... . Tie okazos la Esperanta muzikfestivalo FESTO organizita de Jefo kun Ĉi-jare la famaj lokaj gastoj (belgaj franclingvaj kantistoj) : Gaëtano kaj René Binamé !

